1978 * I * (65)

# starto

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

## Slovo ke čtenářům

Milí čtenáři, dostává se vám do rukou první letošní číslo Starta, nyní s graficky upravenou titulní stranou. Od vydání prvního čísla našeho věstníku uplyne letos již deset let. Proto mi dovolte, abych se na chvíli zastavil u této skutečnosti.

Deset let práce pro existenci periodika tohoto druhu není málo, tím spíše, že to byla práce dobrovolná, plněná s mnoha potížemi! Nebylo přiměřených finančních, technických i organizačních možností a leckdy chyběly i odborné znalosti. Stačí si vzpomenout na cyklostylem rozmnožená první čísla. Přesto lze říci, že čtenáři na ně čekali s velkou netrpělivostí. Teprve po několika letech jsme přistoupili k zásadním změnám pokud jde o formát a grafickou úpravu, tak i co do obsahu.

Někteří naši členové píší, že drobné písmo lze stěží přečíst a že Starto nepřináší aktuální zprávy. To je pravda. Předlohy se píší na běžném psacím stroji a pak se fotografickou cestou zmenší z formátu A4 na formát A5. Starto se tiskne ofsetem, nemáme tudíž zatím možnost zlepšit čitelnost textu.

Aktuálnost lze zachovat do jisté míry včasným dodáním zpráv a dodržením termínu uzávěrky. Je třeba mít stále před očima, že výroba Starta trvá minimálně měsíc od uzávěrky. Nelze proto očekávat, že budete dostávat vždy ty nejposlednější informace. Prozatím nemáme ani dost peněz, ani dostatek obětavých pracovníků, abychom mohli vydávat Starto každý měsíc. Dnes jenom tisk jednoho čísla stojí 4 - 5 tisíc Kčs, nemluvě o psaní expedičních obalů, vlastní expedici a drobných odměnách za redakční a grafickou práci. Za jeden ročník tedy zaplatíme asi 18 Kčs. Tím se dostávám k odpovědi na některé připomínky v naší anketě. Ano, zlepšit věstník po grafické stránce není problém. Mohli bychom jej vydávat na křídovém papíře, ovšem, kde na to vzít? S tím jde ruku v ruce i problém většího počtu fotografií, jejich kvalita a samozřejmě i počet čísel za rok.

Někteří z vás požadovali více zajímavostí ze světa, beletrie, překladů, atd. Je nutné, abychom si znovu řekli, že Starto není časopis, nýbrž svazový věstník, který má spíše informovat než bavit. Byli jsme již žádat, aby mohl vycházet jako časopis a abychom jej mohli registrovat. Zatím to však není možné. Jsme přesvědčeni, že tak, jak jsme vyřešili mnoho ožehavých a spletitých záležitostí, vyřešíme nyní společně i otázku zlepšení našeho tisku. Bylo by však třeba více spolupráce z vaší strany. Z rozeslaných anketních lístků se jich vrátilo sotva 7 procent. Kde jsou ostatní? Že by opravdu nebyl zájem? Nezbytně se pak vtírá otázka, zda to, co děláme rádi a dobrovolně, je i objektivně přijímáno a jakou má naše úsilí cenu.

Z. Křimský

# Rondeta vivo

**B R N O** – Vizitis la urbon s-ro Rakotondravao kun siaj du filoj el Antananarivo (Madagaskaro). En rapide preparita kunveno parolis pri sia lando kaj en sekvintaj tagoj brnaj gesamideanoj dedicis atenton al la gastoj el la malproksima lando kaj montris al ili la urbon kun ĉirkaŭaĵo kaj abismon Macocha. S-ro Rakotondravao parolis antaŭe en E K Praha kaj gastis ĉe la sekcio de KELI. (vd.foton) – Kurson de E.frekventas 9 homoj (malgraŭ, ke 200 afiŝoj ĝin anoncis, kaj malgraŭ kelkaj gazetartikoloj). Instruas J. Vondroušek.

**Č E S K Á T Ř E B O V Á** – EK "Amikeco" aranĝas la 11-an de februaro 1978 sian 9-an Esperanto-balon. Komenciĝo je la 20-a horo en la granda salono de Uzina Klubo de Fervojistoj. Informas: J. Pištora, Nám.Míru 1746,Česká Třebová.

**J A B L O N E C** – Enkadre de la tradicia Nikolaa vespero kun internacia partopreno oni aranĝis tombolon, kies enspezon 349 Kčs oni dedicis al la fonduso de solidareco.

**O S T R A V A** – ER preparis la jenan programon: 4.1.Kantado (Sova), 11.1. ĝenerala kunveno,18.1. Vjetnamio kun diapozitivoj(Ošĉiaŝka), 3.2. Societa balo,15.2. Per Esperanto ĉirkaŭ Francio,22.2.Rememoro pri la februaraj okazaĵoj (Kočvara), 1.3. Kantado (Sova), 8.3. Internacia Tago de Virinoj k. kultura programo, 15.3. UK en Rejkjaviko (D-ro I.Ferenczy el Budapeŝto), 22.3. Vizitoj en GDR ( L. Němec), 29.3. Someraj E- Tendaroj (Kočvara).

Teksto de Esp.prelego pri Estonio kun diapozitivoj pruntebla ĉe A. Stanura, Čkalova 863.

**P Ř Í B O R** – EK aranĝis la 14.12. rememorvesperon al la 80-a datreveno de la unua laborista ER en Příbor.

**T Á B O R** – La 12.12. aranĝis EK ekspozicion pri Esperanta libro kaj gazetaro ligitan kun parolado pri D-ro Zamenhof.

**Z N O J M O** – EK preparis la 15.12. solenan vesperon omaĝe al d-ro Zamenhof samtempe kun ekspozicio de bildkartoj el la tuta mondo.



S-ro Rakotondravao el Madagaskaro kun siaj filoj kaj gastiganto d-ro R. Horský en Prago ( vd.Rondeta vivo – Brno)

65

# gong

Speciální prací prostředek

Pere jemně, potlačuje plstnatění vlny a uchovává vlněné výrobky co nejdéle pružné a pěkné. Je vhodný pro praní vlněného a jemného prádla i úpletů z kadeřavých syntetických vláken

Rakona

# El eksterlando

❀ LA 63-A UK DE ESPERANTO EN VARNA 1978 okazos sub alta protekto de la 1-a vicprezidanto de la bulgara ŝtata konsilantaro Petr Tanĉev.

❀ EN POLLANDO estis lanĉitaj skribaj kursoj de Esperanto en ĉiuj 49 vojevodioj. Ĉiutage venas pli ol 200 aliĝoj. - Aŭskultu ĉiutagajn Esp. programojn el Varsovio. Matene ja la 5,30, vespere je la 22,30 h.

❀ AL VAŜINGTONA ESP. KONFERENCO venis salutletero de prezidento J. Carter. Eĉ se tio estis nur ĝentilaĵo, tamen ĝi estis la unua saluto de prezidento de Usono al Esperanto-konferenco.

❀ FINE DE 1977 solenis sian 85 jariĝon Teo Jung, fondinto de Heroldo de Esperanto, ĝia ĉefredaktoro dum pli ol 40 jaroj, aŭtoro de originalaj romanoj,poeziaj verkoj, tradukinto de i.a. En Okcidento nenio Nova de Remarque.

❀ EN OKTOBRO pasintjara okazis en Zagrebo la jubilea deka internacia pupfestivalo. Dum la dek jaroj ludis en Zagrebo kaj pluaj jugoslaviaj urboj 67 ensembloj el 14 landoj kun 577 prezentadoj ekskluzive en E-o. Norvega delegitaro, kiu partoprenis la festivalon, invitis la Internacian Pupfestivalon por junio ĉijare en norvegajn urbojn.

❀ JUGOSLAVIA ESPERANTISTA JUNULARA ASOCIO ankaŭ ĉijare organizos internacian laborbrigadon por junuloj inter 16 kaj 30 j. Limdato por aliĝo 1.5.1978 ĉe JEJA, V. Pelagića 8/I, 71000 Sarajevo.

❀ UNUAFOJE EN LA HISTORIO de GDR universitato akceptis en sian oficialan instruplanon prelegserion pri planlingvoj. Prelegas d-ro D. Blanke, nun instrukomisisto ĉe Humbolt-Universitato en Berlino.

❀ LABORRONDO ESPERANTO en Lejpzigo, GDR, invitas Esperantistojn partopreni en la Internacia Foira Esperanto-Renkontiĝo, kiu okazos la 11-an kaj 12-an de marto 1978. Aliĝiloj ĉe Kulturbund der D D R, Leipziger Arbeitskreis Esperanto, IFER ´78, DDR - 701 Leipzig, Käthe-Kollwitz Str. 115.

❀ TRIGROŜA ROMANO de B.Brecht aperos en E-o sur ĉ. 490 paĝoj en la 3a kvarono de 1977 en GDR. La libron oni povas mendi ankaŭ en aliaj socialismaj landoj.

❀ PREZIDANTO de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, komitatano de UEA kaj MEM, Graetz Rudi, forpasis la 1-an de oktobro 1977 post subita kaj mallonga malsano.

❀ EN LEEUWARDEN, la ĉefurbo de la nederlanda provinco Frislando, oni proklamis konkurson por la projektoj por nova moderna loĝejtereno, kiu honore al la kreinto de E-o ricevos la nomon LOGEJTERENO ZAMENHOF. En la konkurso partoprenis kvar elstaraj nederlandaj arkitektoj.

❀ LA VINTRA ESPERANTISTA FERIADO okazis en Budapeŝto inter la 28. 12.1977 kaj 2.1.1978. Partoprenis kun hungaroj pli ol 200 esperantistoj el Bulgario, ĈSSR, Italio, FRG, Jugoslavijo kaj Pollando.

❀ KOLEKTANTO estas la nomo de nova revuo de la esperantistaj kolektantoj ĉe Bulgara Esperanto-Asocio. La interesitoj povas ricevi senpagan specimenon rekte de la redakcio (1407, Sofia,postkesto 46, Bulgario).

❀ ESPERANTO-RENKONTIĜON okaze de la Tutmonda Junulara Festivalo en Havano (1978) intencas okazigi la junaj kubaj esperantistoj.Tian arangon dependigas ĉefe partopreno de la Esperanto-parolantoj aŭ simpatiantoj en la naciaj delegitaroj. Oni povas helpi pledante ĉe la naciaj preparkomitatoj kaj ankaŭ ĉe Comité Nacional Preparatorio, 3ra Ave no 1805 7 l° y 20, Miramar La Habana, Cuba.

---

❀ TITO KAJ LA NEALIANCITECO nomiĝas la 40 paĝa broŝuro verkita de d-ro R. Petroviĉ, kiun eldonis Esperanto-societo Sarajevo, Jugoslavio, en 1977. Redaktoro de la esperanta versio estas S. Ĉoliĉ.

---

## Aŭstriaj komunistoj voĉdonis por E-o

LA KONGRESO DE LA AŬSTRIA KP VOĈDONIS 223 : 13 POR ESPERANTO

Komence de decembro 1977 okazis en Vieno la 23-a tutaŭstria kongreso de la Komunista Partio. La unuan fojon en la historio de la komunista movado la kongreso okupiĝis pri la problemo de Esperanto por la plifaciligo de la internacia interkompreniĝo.

Dum la kongreso oni voĉlegis la proponon n-ro 49 pri favorigo de Esperanto por la celo de la komunisma movado. El 246 kongresanoj /laŭ Internaciisto/:

223 voĉdonis por Esperanto
13 voĉdonis kontraŭ Esperanto
10 ne voĉdonis.

Tiu rezulto de la aŭstria Komunista Partio impulsu la komunistajn esperantistojn de ĉiuj landoj agi sammaniere ĉe iliaj partioj.

## Maskva Radio Esperante

Kiel vi jam certe scias, sabate 4.2.1978, en la kadro de itallingva unuhora programo: 18,30 - 19,30 /MET/, Esperanto eksonis ĉirkaŭ 19a horo je kurtondoj 41 m, 49 m /7,32 Mhc, 7,33 Mhc, 6,14 Mhc/. Ripeto estis samtage ĉirkaŭ 21 horo je kurtondoj 41,49 kaj 194 m.

Daŭrigo de la elsendado dependas de reeĥo. Sendu vian dankleteron petante la novajn programojn al: Radio Moskva, itala fako, k-do V. K. Švecov, 113 035 MOSKVO, Pjutnickaja 25, USSR. Ne forgesu ke la sukceso de Esperanto en USSR helpos nialandan movadon.

## Premioj por ĉs filatelistoj

En la tagoj 8. - 16. 10. 1977 okazis en Sezimovo Ústí tutŝtata ekspozicio de laŭtemaj poŝtmarko-kolektoj "TEMAFILA ´77", kiun partoprenis ankaŭ eksterlandaj kolektantoj. La Esperanto-kolektoj estis pritaksitaj jene: "Ĉapitroj el la historio de Esperanto" de V.Váňa - granda orumita medalo + honorpremio, "Historio kaj nuntempo de Esperanto" de D. Bartošík - malgranda arĝenta medalo, "Esperanto en filatelo" de V. Hasala - granda arĝentumita medalo, "Esperanto - internacia lingvo kaj ĝia eĥo en la filatelo" de A. Jakubec - granda bronza medalo. /va/

## Varna 1978

První období přihlášek na světový sjezd ve Varně již skončilo a kongresový poplatek do konce roku 1977 zaplatilo celkem 240 účastníků z ČSSR. Zatím nemáme v přijímání účastníků žádné omezení. Přihlášeným do konce roku 1977 jsme na jejich žádost zajišťovali lehátka a pokud nestačila kapacita, alespoň místenky do vlaku. Od počátku tohoto roku však již ČES nemůže zajišťovat skupinovou dopravu a zájemci, pokud pojedou vlakem, se musí obrátit na nejbližší dopravní kancelář.

Ubytování pro většinu našich členů máme zajištěno ve studentských kolejích asi za 2,5 leva na osobu a den. V soukromí je jen malý počet lůžek s vyššími sazbami. Programy na výlety nebyly zatím v celém rozsahu zveřejněny - jsou zatím stanovena dvě místa pro celodenní výlet a to: Mamaja v Rumunsku a Nesebar - další trasy budou určeny.Předkongres bude ve městě Vraca s přijetím hostí a první službou dne 25.července večer. Je možné se přihlásit na pokongres, kde účastníci poznají krásy bulharského vnitrozemí. Podrobnosti ve II.věstníku, případně E-tisku. Zájemci pište: L. Rýznar, pošt.schr.21, 568 11 Svitavy.

# Aktivaj teknikistoj

El la abunda konferenca traktado de Teknika Sekcio (okt.1977) ni prezentas kelkajn notindajn detalojn:

La sekcio ŝanĝis sian nomon al SCIENCA-TEKNIKA SEKCIO,ĉar ĝi volas sekvi pli larĝan fakan aplikadon de Esperanto, simile kiel okazas en Hungario, Sovetio kaj Bulgario. Ĉiu, kiu deziras la aplikadon partopreni, aliĝu ĉe la sekretario: J. Laube, Alej RA 811, 413 01 Roudnice nad Labem.

Interkonsente kun la hungaraj kolegoj estis akceptita " Scienca rubriko" en "Budapeŝta Informilo" kiel komuna ligilo kaj forumo. Jara abonprezo por 12 n-roj estos 24 Kčs. La abon-aliĝojn por 1978 provizore akceptas (sen pago) la komisiito de STS por informado: Inĝ. Jan Werner, Kroftova 84, 616 00 Brno.

Laŭ la invito de la slovaka scienc-teknika sekcio la ĉeĥa S T S kunarangos SEMINARION PRI APLIKADO DE ESPERANTO EN SCIENCO KAJ TEKNIKO fine de septembro 1978 en Žilina.

Elektroteknika faka grupo ellaboradas esperantan parton de plurlingva vortaro PASIVAJ KOMPONANTOJ POR ELEKTROTEKNIKO eldonota en TESLA Lanškroun. La laborojn pri la esperanta parto koordinas: F. Hort, Palackého 764, 563 01 Lanškroun.

La nomenklaturon de HIDRAŬLIKAJ MEĤANISMOJ prilaboris J. Rybář, Kollárova 1131/11, 363 01 Ostrov nad Ohří.

En la konferenco estis anoncita fondiĝo de laborgrupo por AERONAŬTIKA TERMINOLOGIO. Ĝia perfekta laborplano promesas havigi al ni terminaron kun ĉirkaŭ 1000 terminoj. Kiu deziras kunlabori, aliĝu ĉe: Z. Myslivec, 512 13 Bozkov 110, okr. Semily.

Seplingva BOTANIKA ILUSTRITA VORTARO prilaborata de F. Mlynář, Králická 689, 563 01 Lanškroun, ampleksas jam 5000 terminojn kaj la finpretigo de la manuskripto estas supozata en 1981.

Redaktado de ĉirkaŭ 30 000 slipoj kun teknikaj terminoj progresas daŭre. La konferenco traktis aperigon de ĉeĥa-esperanta POLITEKNIKA VORTARO, sed ne pli frue ol post unu-du jaroj. /we/

SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ '77. Vere leginda aldono de Budapeŝta Informilo. Krom aro da altnivelaj diversfakaj artikoloj sur 100 paĝoj ĝi alportas eminentan analizan prelegon de K. Kalocsay "Pri la vortosistemo de Esperanto". Mendebla ĉe scienc-teknika sekcio de AE SSR,inĝ. A.Bednařík, Lotyšská 8, 834 00 Bratislava. Prezo 30 Kčs. Samloke kaj sampreze estas ricevebla la volumo SK '76. /we/

# SET-Lančov denove "jubilea"

SET LANČOV

La 25a jubilea SET estas for - oni povas aserti,ke sukcese. Kaj ties estraro jam preparas la novan "jubilean SET" 1978, ĉar ĵus antaŭ 20 jaroj, en 1958, SET eklogis en tiu ĉarma kaj mirinda valo ĉe Vranova lago,proksime de la vilaĝo Lančov. Oni profitu kiel eble plej frue partopreni en iu el la du etapoj . La unua limdato por la aliĝo estis la 31-an de januaro 78 kaj vi pagis nur 520 Kčs. La I-a etapo okazos inter la 16-a kaj 29-a de julio, la II-a inter la 30-a de julio kaj 12-a de aŭgusto 1978.

Ne atendu kaj petu pli detalajn informojn je adreso : ESPERANTO - KLUBO TŘEBÍČ, 674 01 T ř e b í č .

# Seminario en Žilina

La ĉs. premiero L. Štrougal en sia "Raporto pri ĉefaj direktoj de la ekonomia kaj sociala disvolviĝo de ĈSSR en la jaroj 1976 - 80" interalie diris: "Por akcelo de la scienc-teknika disvolviĝo de la industrio necesas pli efike eluzi propran scienc-teknikan laboron kaj ĉiujn eblojn de internacia kunlaboro. Jam dum la pasinta kvinjarplano ni penis atingi larĝan internacian kunlaboron en la scienco kaj tekniko. La unuaj paŝoj estis sukcesaj, sed nun necesas en tiu ĉi direkto pli intense daŭrigi."

Tiun ĉi ideon enhavis la "Direktivo por la ekonomia kaj sociala disvolviĝo de ĈSSR en la jaroj 1976 - 80", kiu estis aprobita en la XV-a kongreso de KPĈ.

Do, pli intensa disvolviĝo de nia nacia ekonomio baziĝas sur pli intensa disvolviĝo de la scienco kaj tekniko kaj tiu ne povas neglekti internacian kunlaboron. En tiu ĉi senco devas kontribui al la plenumo de la Direktivo ankaŭ esperantistoj-sciencistoj kaj teknikistoj.

Tial venis anoj de Sciencteknika sekcio de AESSR kun la iniciato organizi en la jaro 1978 seminarion "Apliko de Esperanto en la scienco kaj tekniko". Tiu ĉi ideo trovis apogon ankaŭ ĉe anoj de Scienc-teknika sekcio de ĈEA kaj la tria kunorganizanto fariĝis Domo de Sindikatoj en Žilina - la plej granda kultur-kleriga institucio de Žilina, ĉe kiu laboras loka E - klubo. Ties anoj ankaŭ promesis aktivan helpon.

Do, la urbo Žilina, kiu estas konata kiel "pordego al la naturbelaĵoj de Slovakio" nun malfermas la pordegon al la internacia kunlaboro de sciencistoj kaj teknikistoj. La seminario okazos en la tagoj 7. - 8.10.1978.

La aliĝilojn kaj informojn donas: Ing.Vl.Němec,Hliny 722A, Žilina 1, 010 01.




Fotokopio de la medalo el la tutŝtata ekspozicio de laŭtemaj poŝtmarkokolektoj "TEMAFILA 77".

La ekspozicio okazis en Sezimovo Ústí, ĈSSR, en la tagoj 8.-16. 10.1977.


Sur la medalo aperis unuafoje en la mondo la Esperanto-stelo.

Vidu la paĝon numero 10.

# CHEMOPETROL

-la koncerno por kemia industrio kaj prilaboro de nafto prezentas

**dek fabrikojn ses esplorejojn unu negocejon**



# ESPLORO EVOLUIGO TEKNIKA SERVISO

**por eluzo de kemiaj fadenoj**

CHEMOPETROL

ÚSTAV PRO ZPRACOVÁNÍ CHEMICKÝCH VLÁKEN ČESKÁ TŘEBOVÁ


6510

# SIGNALILO

KIO ESTAS INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO?

IFEF estis fondita la 14-an de aŭgusto 1948 en Amsterdam (Nederlando) sub la antaŭa nomo INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA. La fervojista sekcio de ĈEA fondita en Česká Třebová 1965 estis akceptita kiel membro de IFEF en la jaro 1966 dum la kongreso en Utrecht.

IFEF nombras ĉirkaŭ 3 000 asociajn kaj individuajn membrojn el 19 landoj. La ĉeĥa sekcio havas ĉirkaŭ 130 membrojn. La prezidanto de UEA H. Tonkin konstatis, ke IFEF estas la plej aktiva faka organizaĵo de UEA.

La organo de IFEF "Internacia Fervojisto" aperas sesfoje jare. Ĝi raportas pri fervojistaj novaĵoj, pri internaciaj renkontiĝoj kaj publikigas fakajn artikolojn.

La celoj de IFEF estas:

1. disvastigi la uzadon de Esperanto inter fervojistoj, ĉe fervojistaj organizaĵoj kaj fervojaj instancoj,
2. interkonatigi aktivajn kaj emeritajn fervojistojn, kiuj scipovas aŭ lernas Esperanton,
3. arangi internaciajn renkontiĝojn,
4. eldonadi oficialan organon kaj fakterminaron,
5. kontribui al la ĝenerala kulturo de la membroj.

# Rezolucio de IFEF

La 29-a Kongreso de IFEF okazinta en majo 1977 en Swanwick (Britio) kun 346 partoprenantoj el 17 landoj

konstatas, ke internaciaj organizaĵoj subtaksas aŭ toleras en sia laboro la malfacilaĵojn de la interkompreniĝo, precipe en internaciaj konferencoj kaj kunvenoj,

denove akcentas, ke pro nacia prestiĝo neniu lingvobloko pretos apliki la lingvon de la alia nacio aŭ lingvobloko,

ripetas, ke ĝuste nun la fervojaj entreprenoj, fervojistaj organizaĵoj kaj sindikatoj ekkonu kaj utiligu al si ĉiun ŝancon por redukti la enormajn elspezojn por la interpretista kaj traduka servoj,

substrekas, ke helpe de komuna, facila, esprimkapabla, neŭtrala lingvo la forigo de la laingvaj malfacilaĵoj post relative mallonga tempo estus realigebla,

sugestas por atingi tiun ĉi celon apliki la ĉiuflanke elprovitan internacian lingvon Esperanto. La Internacia Fervojista Esperanto-Federacio ofertas tiucele sian subtenon.

ALTA HONORIGO AL J. ŘEBÍČEK

Okaze de la 29-a Kongreso de IFEF en Swanwick, nia longjara membro Ing. Jaromír Řebíček el Havlíčkův Brod, estis pro siaj meritoj en fervojista Esperanto-movado, nomita honora membro de IFEF kun rajto porti Oran Insignon de IFEF. La komitato de FS ĈEA kore gratulas pro lia honorigo kaj deziras al li multe da sano en lia riĉa, fruktodona vivo.

FS ĈEA sincere dankas al František Markl por lia multjara kaj senprofita laboro en funkcio de sekretario de la fervojista sekcio de ĈEA kun sidloko en Česká Třebová. F. Markl plenumis tiun ĉi pretendan funkcion konscience ĝis sia rezigno komence de ĉi tiu jaro.

# Lingva angulo

Lingvan korektecon devas atenti kaj gardadi en ĉiuj lingvoj antaŭ ĉio la publicistoj, t. e. verkistoj, redaktoroj kaj ĵurnalistoj. Tio des pli validas por la Internacia Lingvo, kie la lingva tradicio kaj inercio ne estas tiel forta, kiel ĉe la etnaj lingvoj, kaj la libroj kaj periodaĵoj servas al multaj lernantoj kiel modelo aŭ perfektigilo.

Pri tio verŝajne ne havas ideon la eldonanto kaj redaktanto de periodaĵo, kiu ĵus venis en miajn manojn kaj portas la daton Majo 1977 kaj n-ron 106. En ĝi troviĝas krom nemultaj preseraroj ankaŭ konsekvence ripetitaj krudaj gramatikaj eraroj. Jen kelkaj el ili:

korekte tekstu:

Hugo Steiner ... vidis en ĝi Scienca Instituto — Sciencan Instituton

Ankaŭ sia agado en la Universitato Wien — Ankaŭ lia agado....

En oktobro 1976 estis fondata — ...estis fondita...

/ĉar temas pri plenumiteco /

honorigoj estis asignataj al li — ...estis asignitaj....

/ĉar temas pri emfazo de la plenumiteco de la ago/

Oni jam nun intencas dungi duan civilservanton bone sciante Esperanton, tajpadon kaj oficteknikon. — ...bone sciantan..

La redaktoro "reformas" ankaŭ niajn landnomojn jene:

Franco /plurfoje uzita/ — Francio, Francujo

Portugalo — Portugalio, Portugalujo

Norvego — .Norvegio, Norvegujo.

Britanio — Britio, Britlando

Romanio, romana — Rumanio, rumana

Konsekvence de tio uzo devus aperi monstraĵoj: francanoj, portugalanoj, norveganoj, britanianoj, romanoj, ks.

Do al la eldonanto de ĉi tiu trimonata periodaĵo mankas bazaj lingvoscioj aŭ estas obsedita de lingvo-reformemo. Aŭ, en la kazo de fuŝa uzo de pasivaj participoj, li volas obstine spiti al la Zamenhofe normiga decido de la Akademio de Esperanto.

Tio ĉio estas bedaŭrinda, ĉar temas pri la Informilo de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien /Instituto pri la Internacia Lingvo/, kies devo estas gardi la tradicion kaj sanan evoluon de Esperanto kaj observi la decidojn de la Akademio. Kaj bedaŭrinde ĝi estas ankaŭ pro tio, ke temas pri Informilo enhave interesa, alportanta ofte freŝajn sciigojn el nia movado. Ĉiaj legantoj estos al la eldonanto certe dankemaj por pli da zorgemo kaj lingva disciplino.

Jiří Kořínek

## Bibliografioj pri IDO kaj VOLAPÜK

Prepariĝas por eldono en 1978 du planlingvaj bibliografioj pretigataj de Carlevaro T. /adr.Chapelle 7, CH-2208 Les Hauts-Geneveys/ por IDO kaj de Haupenthal R. /Franz-Schubert-Str.26, D - 6602, Dudweiler/ por VOLAPÜK. La ĉefa celo de ambaŭ estas dokumenti la ekziston de la aperintaj libroj kaj revuoj en ia biblioteko,do la faktan ankoraŭan ekziston. La aŭtoroj estas dankaj por atentigoj.

## Ni funebras...

Forpasis longjara aktiva membrino de LG ĈEA en Kyjov,profesorino J. Čermáková el Přerov.

En Kladno mortis la 21.7.77 MUDr. Antonín Mužík en la aĝo de 69 jaroj.

Forpasis en Ústí n.L., aĝa 69 jarojn la eksa prezidanto de la tiea klubo Karel Fanta. Li estis prezidanto de la unua postmilita ĉs.Esperanto-kongreso en Liberec.



BĚŽNOU KOUPEL ZMĚNÍ V PŘÍJEMNÝ POŽITEK

# avela

KOSMETICKÁ KOUPELOVÁ PŘÍSADA

Lázeň s AVELOU příznivě působí na pokožku i na celý organismus.
Tělo osvěží, očistí, provoní, organismus celkově uvolní.

---

Vyberte si ze tří variant tu, která vám bude nejlépe vyhovovat:
AVELA s přísadou vitamínů a vůni po čerstvém jehličí,
AVELA s přísadou biosíry a vůní typu Fougere,
AVELA s regenerační přísadou a vůní typu Mustang.
Přesvědčte se, že radost a požitek při koupeli dá




RAKONA · ZÁRUKA KVALITY

6513

# Zprávy ze sekretariátu ČES

PLACENÍ ČLENSKÝCH PŘÍSPĚVKŮ

Poprvé v historii svazu jsme docílili splnění finančního plánu členských příspěvků do konce předchozího roku. Děkujeme všem, kdož se o to přičinili. To však neznamená, že již všichni obnovili členství. Znovu vás upozorňujeme na velmi výhodné doživotní členství za 600,-- Kčs. Ušetříte tím práci sobě i nám, pomůžete stabilizovat členskou základnu a nebudou na vás platit případné změny poplatků. Získáte navíc určité výhody. Čekáme na stého doživotního člena, kterému předáme při slavnostní příležitosti novou legitimaci a upomínku na slavnostní den. Koncem dubna uveřejníme celkový počet našich členů. Ať je jich tedy co nejvíce. STARTO č.2/78 obdrží již pouze ti, kteří splnili svoji základní povinnost. Nedostanete-li od svých místních skupin složenku,napište přímo nám.

SINDEFENDO EN ESPERANTO - SENPAGA ALDONO DE STARTO

Dum la jaro 1978 vi trovos aldonon pri sindefendo al ĉiu kajero ne pro tio, ke la geesperantistoj lernu ĝin por batali kun malamikoj de Esperanto, sed simple pro tio, ke nia ano, specialisto kaj aŭtoro kelkaj libroj je tiu ĉi temo en la ĉeĥa lingvo, resumis esencon de siaj verkoj kaj tradukis ilin en la internacian lingvon. Li kelkfoje devis eĉ serĉi tute novajn esprimojn. Fine de la jaro vi trovos ankaŭ koverton por tiu ĉi aldono. Eble por multaj ĝi ne estos sole rara novaĵo, sed ankaŭ utila legaĵo.

---

KIU POVAS HELPI JAPANAN SAMIDEANON, tradukiston el la ĉeĥa, Kei Kurisu ( adr.: Mogusa Danti 154-1004, Hino-si, Tokio, Japanio 191)per havigo al li de tri mankantaj eldonoj de la fama verko de Fučík "Raporto desur eŝafodo".Temas pri la 4a el 1947,8a el 1948 kaj 20a el 1954.

KIEL LONGE VI VOLAS ANKORAŬ ATENDI

kaj ne profiti nian libroservon? Konstante ni ricevas novajn volumojn el la tuta mondo. Baldaŭ venos libroj el Japanio, Finnlando,Svedio aŭ eldonaĵoj de UEA, kiel ABZ de la amo, PIV kaj novaj stereogramofondiskoj el Usono kun belegaj melodioj kun Esperantaj tekstoj. Konstantaj antaŭmendoj estas akcepteblaj. Se vi konsentos, ke ni poste sendu al vi ĉiun ricevotan novaĵon, ni ambaŭ estos kontentaj, ĉar ĉiam temas sole pri kelkaj ekzempleroj.

GLUMARKOJ KUN ESPERANTA TEKSTO

aŭ kun la teksto kiu propagandas Esperanton, estas mendeblaj en nia oficejo. Ne forgesu, ke sole konstanta, delikata kaj bone grafike preparita propagando povas esti SUKCESA. Niaj glumarkoj certe estas tiaj.

| Je via mendo atendas: | Kčs |
|---|---|
| Kongresaj glumarkoj /Varna/ en ora, verda kaj nigra koloroj ĉiam 10 glumarkoj en unu folio | 6,-- |
| Esperanto parolata - blanka, blua, verda kaj ruĝa koloroj ĉiam 3 glumarkoj sur unu folio | 3,-- |
| Per Esperanto por la mondpaco - verda, nigra, flava kaj blanka koloroj - 24 glumarkoj sur unu folio | 5,-- |
| Esperanto kunligos vin kun la tuta mondo - flava, ruĝa, verda kaj blanka koloroj - 28 glumarkoj sur unu folio | 6,-- |
| Glumarkoj el diversaj Esperantaj kongresoj po | 2,-- |

## KIEL VI VIDAS STARTO ENHAVAS PLI DA REKLAMOJ OL ANTAŬE

Tio estas konsiderinda helpo al nia asocio por plibonigo de la grafika vizaĝo de la bulteno. Estas necese tuj reagi al reklamoj /sufiĉas simpla bildkarto/ kaj esprimi interesiĝon pri tiaspeca reklamado aŭ dankon pro la subteno al nia movado. Tre petataj estas reeĥoj el eksterlando. Helpu al ni, ni helpós al vi.

## NIA SEKRETARIO AKCEPTIS NOVAJN GEOFICISTOJN

anstataŭ samideaninoj Ernstová kaj Kvasničková, al kiuj ni okaze denove dankas por ilia laboro kaj esperas, ke ili restos niaj fidelaj aninoj ankaŭ estonte.

Niaj oficistoj devas sian specifan laboron unue ekkoni, sed ni kredas, ke vi baldaŭ havos samnivelajn, se ne pli bonajn servojn. La nomoj de niaj novaj geoficistoj estas Johano SAINER kaj Naděžda NÝDLOVÁ, ambaŭ el Praha.

## PLUA SERVO DE NIA SEKRETARIEJO

por tiuj, kiuj interesiĝas pri korespondado. En ĈEA kuŝas leteroj de diverslandaj gesamideanoj, kiuj serĉas siajn gekorespondatojn. Ĉeĥajn gesamideanojn demandu pri leteroj el lando, kie vi volas havi geamikojn. Aldonu poŝtmarkon 1,-- Kčs por respondo, aŭ sendu jam koverton kun via adreso, afrankitan per 0,60 hal. poŝtmarko.

## KONGRESKOTIZOJ POR UK VARNA

jam forsendis nia asocio al la konto de la 63a UK en Varna pli ol Kčs 70 000 kiel kongreskotizojn. Laŭ sciiigo de LKK nia lando estas la unua el socialismaj landoj, kiu jam pagis kotizojn por siaj anoj. Kiu volas ankoraŭ partopreni, ne atendu. Nia servo daŭros ĝis la fino de marto. Poste ni ne plu povos helpi vin por transpagi kotizojn.

## KOMISE MLÁDEŽE ČES

ve spolupráci s Interkluby SSM pořádá mezinárodní soutěž dětských výtvarných prací na téma: "MOJE ZEMĚ". Zúčastnit se mohou děti do 15 let. Každá práce musí být čitelně podepsaná s uvedením věku a země. Všechny práce budou odměněny. Uzávěrka je do 30. dubna 1978. Práce posílejte na adresu svazu s označením "mládeži". Podpořte naši akci.

**Publikaj lokoj en ČSR nomitaj laŭ ZAMENHOF ks.**

Certe estas interese scii, kiom da stratoj, placoj kaj aliaj lokoj en nia lando havas nomojn, kiuj per si mem atentigas la publikon pri nia movado. Unua simpla enketo rezultis en jena mallonga listo. Ni petas ĉiujn, kiuj povas ĝin kompletigi aŭ ĝustigi, ke ili tion faru skribe. Tio koncernas ankaŭ niajn legantojn en Slovaka Socialisma Respubliko. Ni esperas, ke la sekvonta listo estos pli longa.

1. Hradec Králové: Zamenhof-strato /apud la ĉefa stacidomo/, 2. Nový Jičín: monumento al Theodor Čejka, 3. Olomouc: Zamenhof-strato kaj Esperanto-monumento en Smetana-parko, 4. Ostrava: monumento en Zengr-strato, 5. Ostrava - Bohumín: Esperanto-monumento en Bezruč-parko, 6. Pardubice: Schulhof-strato, 7. Velké Losiny / distr. Šumperk/ : Esperanto - arbo en la kastela parko.

## Kroniko

La 5.1.1978 65jariĝis M.Skařupová, organizinta kune kun sia edzo somerajn E-kursojn en Rožnov. Ŝi ankoraŭ vigle partoprenas la kluban aktivecon.

La 2.12.1977 ĝisvivis 75 jarojn A.Bartoněk, unu el la fondintoj de EK Poruba kaj dumviva membro de ĈEA.

Okdekjariĝis la 19an de januaro membro de Loka Grupo ĈEA en Pardubice, J. Pauk, partopreninto de la XIIIa UK en Prago, 1921. Ĝis hodiaŭ li aktive laboras pro la prospero de la movado.

# LABORISTAJ ESPERANTISTOJ EN NORDA BOHEMIO.

La 81-jara veterano de laborista Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio, Otto Dibelka el Skalice u České Lípy prunte disponigis al mi materialon pri fondiĝo kaj agado de la distrikta organizaĵo de Ĉeĥoslovaka Laborista Asocio Esperantista /CLAE/. El tiu materialo evidentiĝis, ke CLAE kun sidejo en Ústí nad Labem estis fondita en januaro 1930 kaj apartenis al I.S.E. kun sidloko en Vieno. Laŭ iniciato de k-doj Tischer kaj Görlich estis necese fondi efektive socialistan, laboristan organizaĵon, ĉar en la neŭtralaj grupoj jam pluraj anoj fariĝis faŝistoj, Henlein-anoj. Temis ĉefe pri germanaj Esperanto-grupoj.

La 11-an de junio 1933 estis fondita la Nordbohemia Distrikta Organizaĵo de CLAE en Hieges-gastejo en Svor apud Cvikov.

En la protokoloj, ekz. pri la konferenco la 16-an de julio 1933 okazinta en la Laborista Hejmo en Česká Kamenice videblas, ke la ĉefagantoj estis k-doj O. Dibelka en Skalice u České Lípy, Knobloch el Dolní Kamenice, Strážek el Svor kaj Schiller. En la protokolo de la 11.6.1933 ni legas i.a. en parolado de k-do Görlich pri fondiĝo de Ĉeĥoslovaka Laborista Asocio Esperantista laŭ iniciato de k-do Tischer. Laŭ paragrafo 5 de statutoj de CLAE "la laboro de la Asocio devas diferenciĝi de tiu de la aliaj asocioj ĉu burĝaj, ĉu aliaj. Ni volas labori sur reala bazo de socialisma movado.... La unua tasko de nia asocio estas, ke la socialdemokrata partio rekonu Esperanton kaj apliku nian lingvon por la laboristaro". El pluaj protokoloj rekoneblas, ke prezentiĝis kontraŭaj opinioj, nome, ke anoj de CLAE povu fariĝi ne nur socialdemokratoj, sed sinceraj socialistoj - kontraŭfaŝistoj ĉiutendencaj. La 13-an de aŭgusto 1933 jam okazis la 3-a konferenco en Skalice u České Lípy.

La 1-an de oktobro 1933 okazis konferenco en gastejo Palme en Kamenický Šenov. La protokoloj estas Esperantlingvaj, sed klaras ke la plejparto de la anoj de CLAE estis de germana nacieco, laboristaro jam tiam ekluktanta kontraŭ la minacanta hitlerfaŝismo.

El pluaj protokoloj, kies protokolanto estis plejparte O. Dibelka, oni konstatas viglan agadon kaj societan vivon en la grupoj de CLAE en norda Bohemio. Ekzemple en la protokolo de la Dua generala distrikta kunveno, kiu okazis 3.6.1934 en Hieges-gastejo en Svor /ĉeestis 22 k-doj/ ni legas: "Antaŭ la komenco de la tagordo k-do Schiller postulis gek-anojn ekleviĝi de siaj seĝoj je honoro pri la oferoj de niaj k-doj en Aŭstrio, kiuj batalmortis heroe sur kampo de libereco."

La aktivado de CLAE en Norda Bohemio laŭ la enrigardebla materialo daŭris de jaro 1933 ĝis 1938, kiam ĝi estis likvidita fare de okupaciintaj germanaj faŝistoj. La lasta kunveno de CLAE okazis la 15-an de majo 1938 en gastejo Gericht en Skalice u České Lípy.

Jiří Kořínek

Rimarkigo de la aŭtoro:
Estus konsilinde, ke s-ano Otto Dibelka / 471 17 Skalice u České Lípy č. 159 / en konvena tempo savu la interesan historian materialon antaŭ perdiĝo per donaco al la arkivo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

# TURISMA KALENDARO POR 1978 JARO

| | | aranĝas: |
|---|---|---|
| 28.1. - 29.1. | Karnavala Esperantista Renkontiĝo en Györ, Hungario | Teritoria Komitato de HEA H-8002 Györ, PF 228 |
| 9.2. - 16.2. | Internacia kurso de Esp.-pilotoj en Swiecie, Pollando | PEA, Centro de Turismo, Str.M.C.Sklodowskiej 10/4 PL-85-094 Bydgoszcz |
| 24.2. - 26.2. | Semajno de Internacia Amikeco en Pécs, Hungario | Teritoria komitato de HEA H 7601 Pécs, PF 2 |
| 11.3 - 12.3. | Internacia Foira E-Renkontiĝo 1978, okaze de printempaj foiroj en Leipzig GDR . | Kulturbund de DDR, Leipziger Arbeitskreis ESPERANTO, IFER 78, Käthe-Kollwitz Strasse 115, DDR-701 LEIPZIG. |
| 22.4. | Printempa Pacmarŝo en Jablonec nad Nisou, CSR | Esp.klubo ĉe Kulturcentro, CS 466 21 Jablonec n. N., PK 190 |
| 29.4. - 1.5. | Junulara Esp.Renkontiĝo en Zalaegerszég, Hungario | Teritoria Komitato de HEA H-8901 Zelaegerszég, PF263 |
| 12.5. - 14.5. | Zamenhofa Internacia Pacmarŝo | Budapeŝta Teritoria Komitato, H-1443 Budapeŝto, PF 153 |
| 22.5. - 27.5. | Ĉebalta Esperanto-Printempo en Mielno, Pollando | PEA, Centro de Turismo, Str.M.C.Sklodowskiej 10/4 PL-85-094 Bydgoszcz |
| 26.5 - 28.5 | Renkontiĝo de esperantistoj en PODĚBRADY kun la novaj adeptoj el korespondaj kurzoj | ESPERANTO KLUBO-LG ĈEA sam. POLNICKY Pavel 290 01 PODĚBRADY IV.ČSSR |
| 1.6. - 4.6. | Internacia Esp. Renkontiĝo "Bydgoszcz 78", Pollando | PEA, Centro de Turismo, Str.M.C.Sklodowskiej 10/4 PL-85-094 Bydgoszcz |
| 4.6. - 7.6. | Renkontiĝo de Amikeco en Toruń, Pollando | PEA, Centro de Turismo, Str.M.C.Sklodowskiej 10/4 PL-85-094 Bydgoszcz |
| 4.6. - 25.6. | E.-Feriado Punka-Slupsk-Koszalin-Gdańsk-Bydgoszcz / 3 etapoj/ | PEA, Centro de Turismo, Str.M.C.Sklodowskiej 10/4 PL-85-094 Bydgoszcz |
| 22.6. - 29.6. | E.-Feriado Grudziadz-Rudnik-Malbork-Gdansk-Chelmno- Toruń, Pollando | PEA, Centro de Turismo, Str.M.C.Sklodowskiej 10/4 PL-85-094 Bydgoszcz |
| 25.6. - 2.7. | E.-Feriado Punka-Slupsk-Koszalin-Gdańsk-Bydgoszcz, Pollando | PEA, Centro de Turismo, Str.M.C.Sklodowskiej 10/4 PL 85-094 Bydgoszcz |

| | | |
|---|---|---|
| 6.7. - 13.7. | E.-Feriado Grudzladz-Rudnik-Malbork-Gdansk-Chelmno-Torun Pollando | PEA, Centro de Turismo, Str.M.C.Sklodowskiej 10/4 PL-85-094 Bydgoszcz |
| 2.8. - 7.8. | 16-a Somera Esp.Universitato en Gyula, Hungario | SEU, 48-as tér 11, H-5701 Gyula |
| 2.7. - 15.7. | Somera Esperanto-Tendaro en Lancov, ČSR /nur por infanoj ĝis 15-jaraj/ | Esperanto-klubo, PF 72, 674 01 Třebíč |
| 9.7. - 22.7. | Somera Esperanto-Lernejo ĉe valbarajo Ružin, SSR | Esperanto-klubo, Švätoplukova 31, 040 00 Košice |
| 10.7. | Internacia Virina Renkontiĝo en Budapeŝto, Hungario | Virina Komisiono de HEA, PF 193, H-1368 Budapeŝto. |
| 12.7. | Fervojista Renkontiĝo en Debrecen, Hungario | Teritoria komitato de HEA, PF 21, H-4003 Debrecen |
| 16.7. - 12.8. | Somera Esperanto-Tendaro en Lancov, CSSR (du etapoj) | Esperanto-klubo, PF 72, 674 01 Třebíč |
| 17.7. - 26.7. | 11-a Internacia Renkontiĝo Naturamika, Abaliget, Hungario | Teritoria Komitato de HEA PF 2, H-7601 Pécs |
| 29.7. - 5.8. | 63-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, VARNA, Bulgario | Linhart Rýznar, PF 21, CS 568 11 Svitavy (por partoprenantoj el ČSSR) |
| 12.8. - 18.8. | Turisma Semajno en Slovakio, SSR | Peter Pavlík, Konrádova 6/8, CS 052 01 Spišská Nová Ves |
| 15.8. - 21.8. | 7-a Varia Internacia Semajno en Budapeŝto, Hungario | Budapeŝta Teritoria Komitato, PF 153, H-1443, Budapeŝto |
| 20.8. - 27.8. | Turisma Esperanto Feriado ĉe valbaraĵo Lipno, ČSR | Esp.rondeto "La pon o"ĉe ...zina klubo JITEX, CS 397 11 Písek |
| 8.9. - 10.9. | 3-a Aŭtuna Migrado en montaro Mátra, Hungario | Turisma Komisiono de HEA, PF 2, H-7601 Pécs |
| 3.9. - 16.9. | 15-a Internacia E-Feriado en Miedzygorze, Pollando | PEA, Centro de Turismo, Str.M.C.Sklodowskiej 10/4 PL-85-094 Bydgoszcz |
| 15.9 - 17.9 | Renkontiĝo de esperantistoj en Mělník/CSSR/ kunligita kun seminario por funkciuloj de ČEA. | ESPERANTO RONDETO LG CEA P.K. 26,276 01 MĚLNÍK,CS |
| 30.9. | Plena kunsido de CENTRA KOMITADO DE CEA dedicita al la 60-an datravenon de la estiĝo de la komuna ŝtato de Ĉeĥoj kaj Slovakoj. Gastoj estos akceptotaj. | ČEA-Jilská 10, Praha 1 |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 27.11. - | 3.12. | 4-a Internacia Foiro de Esp. Turismo en Warzawa-Toruń-Bydgoszcz-Zakopane | Buroo de Junulara Turismo JUVENTUR, Str.Jagiellonska 12, PL 85-067 Bydgoszcz |
| 27.12. - | 2.1. 1979 | 8-a Vintra Esp.Ferio en Budapeŝto, Hungario | Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA, PF 153, H-1443 Budapeŝto,Hungario |

---

***



## N I  N E  H E Z I T U .....

Necesas ĝeneraligi niajn jamajn atingojn, internaciigi la sukcesojn en la unuopaj landoj, kaj konstrui novajn sukcesojn sur la jam atingitajn.

Ni posedas multajn avantaĝojn, kiujn ne posedis niaj antaŭuloj. Unue, ni laboras por matura lingvo - pruveble pli fleksebla kaj pli profunda ol tiu de 1924. Due, ni laboras per fleksebla kaj unueca Asocio. Trie, tiu Asocio estas finance kaj administre solida, dank' al la ŝparoj kaj plifortiĝoj de la pasintaj tri jaroj. Kvare, kaj ĉefe, ni laboras en mondo, kiu, kvankam ankoraŭ longe for de tiaj atingoj, tamen komencas kompreni la valoron /aŭ, pli precize, la neceson/ de harmonia kunvivado en spirito de reciproka komprenemo. Unu el la necesaj kondiĉoj de tiu komprenemo estas, aŭ devas esti, taŭgaj lingvaj rimedoj. Naciaj lingvoj eble povas helpi, sed nur Esperanto povas liveri tiun duoblan garantion, nome la garantion de kultura diverseco kaj internacia kompreniĝo.

Ni posedas la rimedojn. La kondiĉoj estas maturaj. Do, la vojo estas malferma kaj la sojlo transpasebla. Ĉu ni kuraĝe antaŭeniros aŭ time hezitemos? Ĉi-foje ni ne hezitu. Ni prenu per ambaŭ manoj la defion de 1978. La vojon al la ĝenerala utiligo de Esperanto ni firme kaj definitive malfermu.

(El novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA H. Tonkin)

## Por naturamikoj

Tiun temon starigas al si eble ĉiu,kiu foliumas la kalendaron de la jaro 1978. Multaj jam decidiĝis kaj subskribis la aliĝilon por la UK en Varna, aliaj daŭre aliĝas. Sed estas ankoraŭ granda grupo de membroj, kiuj preferas pli proksiman landon, pli malgrandan kolektivon /kaj ankaŭ pli malaltan elspezon/ en kiu cento de partoprenantoj pli facile interkonatiĝas.

Unu el tiuj eblecoj estas Internacia Renkontiĝo Naturamika/IREN/ en Abaliget, proksime de la urbo Pécs en suda Hungario. En la kampadejo, kiu parolas dek tagojn esperante, estas agrabla loĝado kaj ĝia pura restoracio gastigas la vizitantojn tri foje po tage. La organizantoj sukcese reguligas la aliĝintojn tiel, ke unuopaj nacioj estu reprezentitaj po dudeko da memoroj el diversaj socialismaj landoj, sed ne mankas gastoj, kiuj venas de malproksime kun siaj novaj geamikoj. Kvankam oni zorgas dum la renkontiĝo je regula instruado de Esperanto, tamen plej akcentita estas la vigla konversacio, kiu dank al varieco de la vizitantoj devigas ĉiun paroli esperante tiel, kiel ŝi aŭ li lernis ĝin antaŭ la alveturo. Krom komunaj ekskursoj tra la naturo, banado en lago kaj agrabla ripozo, la organizantoj ankaŭ enprogramigas aŭtobusajn vojaĝojn al iom pli malproksimaj lokoj, dum kiuj oni ekkonas ankaŭ la historiajn memorindaĵojn ekde la Romia epoko.

La partoprenkotizo estas ankaŭ akceptebla. Laŭ la postulo pri loĝado, kun ĉiuj programeroj kaj aŭtobusaj ekskursoj kaj 3-foja mango oni pagas inter 800 - 1 200 Kčs, laŭ la kategorio de la dezirata komforto. La lindaĵo por aliĝo estas ĝis la 31-a de majo, sed pro granda intereso povas ĉe lastaj aliĝintoj okazi obstakloj, speciale malkreskas la ŝanco elekti pli komfortan loĝadon. Abaliget gastigos vin de la 17a ĝis la 26a de julio. Aliĝilojn sendos L.Rýznar,p.k.21,568 11 Svitavy. /lr/

## Interesa demando

"Enketilo" ĉirkaŭiras la mondon,eble nur Eŭropon,kun tiu ĉi eksterordinare interesa kaj sendube originala demando: "Se vi estus kondamnita al ekzilo sur fora dezerta insulo,kun la ebleco kunporti nur dek librojn en Esperanto, kiujn librojn vi elektus?"

Leginte tiun ĉi alvokon mi konsterniĝis. Kio okazos? Ĉu oni ekzilos la esperantistojn? Sed iom pli poste mi trankviliĝis: la demando estas formulita en kondicionalo...Tamen mi ekmeditis.Kaj post longa, animprema meditado mi trovis la respondon: Estimataj gesamideanoj, ni estu iom praktikaj. Jetu for la iluziojn! Pensu pri tio, ke en la ekzilo ni havos malmulte da ŝanco por pasigi la tempon en la societo de niaj plej ŝatataj E-verkistoj...Do,mi proponas al ĉiuj kunporti la sekvontajn librojn: 1. Precizan geografian maparon. 2. Unu libron pri la ŝipkonstruado /povas esti eĉ pli ol unu/. 3. Unu libron pri navigacio /povas esti eĉ pli ol unu/. Kompreneble, ni devos esti singardaj, ke entute da libroj ne estu pli ol dek.

Ĉu vi volas atentigi min, ke nur poŝatlaso de la mondo ekzistas en Esperanto? Ne gravas. Ek,esperantistaj fakuloj! Kompilu la mankantajn nemalhaveblajn verkojn! Por via laboro estos dankema arego da savotoj. Eble unusola homo restos malkontenta: la dissendinto de tiu "enketilo", kiu pensas, ke oni povas ekkoni legadpreferojn de esperantistoj nur perspektivigante al ili ekzilon. Éva Tofalvi-Knichalová

---

STARTO - tiskový orgán ČES.Vychází 6x ročně. Řídí redakční rada ve složení: ing.Fr.Sviták, Jar. Mařík, PhDr.Jar. Jermář, CSc. Odpovědný redaktor Oldřich Knichal.Grafická úprava Jar.Klement. Tiskne rozmnožovna Podniku služeb Neratovice. Předáno do tisku dne 12. února 1978.

# LASTMOMENTE ...

Preskaŭ ĉiuj niaj lokaj grupoj jam kunvenis por trakti pri kiel estis plenumitaj taskoj en estinta jaro. Estis videbla,ke tie,kie niaj funkciuloj preparis laborplanojn realisme,estis bonaj rezultoj kaj movado estis akceptita tre favore planke de la ne esperantistoj. Ekzemple nia loka grupo en ČESKÉ BUDĚJOVICE,kiu laboras ĉe kultura domo,ricevis altan subtenon financan eĉ moralan.
Venis de tieĉi nova kaj ni diru eĉ bezona ideo- kunligi kelke da lokaj grupoj en kelkaj agadkampoj kaj plifortigi tiamaniere la akcenton de nia laboro. En suda Bohemio oni preparas unuajn paŝojn tiucele kaj ni deziras al ĉiuj sukceson.

KOMISIONO JUNULARA DE ĈEA

prepraras kun INTERKLUBOJ de Asocio de Socialisma Junularo konkurzon de infanaj desegnaĵoj.Temo : Mia lando. Partopreni povas geinfanoj ĝis 15 jaroj. Aldonu vian adreson, aĝon kaj landon.Limdato 30.4.1978.

Nia adreso: ĈEĤA ESPERANTO ASOCIO ,JILSKÁ 10, 110 00 PRAHA 1.

Sur koverto surskribu : INFANA KONKURZO. Nesendu pligrandformatajn desegnaĵojn ol formato " A4 ". Ĉiu ricevos malgrandan donaceton de ĈEA!

Ĉeĥa Esperanto Asocio

kunvokas plenkunsidon de asocia Centra komitato,laŭ la laborplano,en PRAHA je tago 8.aprilo. Eventualajn viajn proponojn rapide sendu al sekretariejo.

Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR

organizos internacian sciencan seminarion pri la temo " Sciencaj aspektoj de Esperanto". Ĝi okazos de 17. - 23. aprilo 1978 en la baltmara ripozloko AHRENSHOOP - GDR. El nia lando estis invititaj jenaj niaj anoj : PhDr Jermář CSc,D-ro, ing. Fritsch, RNDr Josef Kavka CSc.

XI-an konsultiĝon de la gvidantoj

de esperantaj organizaĵoj el eŭropaj socialismaj landoj preparas jam Asocio de Esperantistoj en Slovaka socialisma respubliko en Poprad . Ĝi okazos en la tagoj 21.3 - 27.3.1978. Niaflanke partoprenos gesamideanoj : Vítek, Křimský,Kočvara Drah.,Rýznar,Walterová.

NI URĜE BEZONAS KAPABLAN TRADUKISTON/INON/

kiu povas rapide,rekte kaj precize tradukadi por nia asocio tekstojn sur menditaj reklamoj. Laboro estos "simbole pagita "



**ankaŭ por vi**

**funkcias**

## LIBROVENDEJO DE ĈEA

Se vi volas,uzu tiun ĉi liston kaj mendu bezonajn titulojn ĉe ni kaj sendu la liston al nia adreso . Se neestos momentale la libroj en nia stoko ni informos vin , poste vi decidos,ĉu nuligi la mendon aŭ ĉi vi atendos .

| T i t o l o | kĉs | mendo |
|---|---|---|
| 1.Tragedio de l´homo | 25 | |
| 2.PANORAMO -Vitreroj | 16 | |
| 3.Balaton | 11 | |
| 4.Budapest | 11 | |
| 5.Kvaropo | 44 | |
| 6.Doktoro Esperanto /Finlando /-enciklop- | | |
| 7. | 180 | |
| 8.Krucenigmoj | 10 | |
| 9.Stereo gramodisko el USA | 110 | |
| 10.Esperanto en Persp. | 840 | |
| 11.Fausto I | 21 | |
| 12.Fingrulino | 7 | |
| 13.Fabeloj de Andersen | 45 | |
| 14.Franca arto en Praga | 3 | |
| 15.Paŝoj al plena posedo | 19 | |
| 16.La montara krono | 30 | |
| 17.Poŝatlaso de la mondo | 20 | |
| 18.Okupacio | 8 | |
| 19.Sklavoj de Dio | 30 | |
| 20.Dudek horoj | 16 | |
| 21.Danjo en Vjetnamio | 10 | |
| 22.Komenio kaj i.l. | 4 | |
| 23.Kalevipoeg | 6 | |
| 24.Frazeologiaj esprimoj | 20 | |
| 25.La mastro de Körboja | 5 | |
| 26.Kanto super lulilo | 4 | |
| 27.La leteroj de Zamenhof | 155 | |
| 28.Ovo vortareto | 20 | |
| 29.Koko kria jam | 39 | |
| 30.Streĉita kordo | 9 | |
| 31.Turista kantaro | 20 | |
| 32.De pago al pago | 29 | |
| 33.Hungario sur bk | 55 | |
| 34.Učebnice esperanta / Cink / | 15 | |
| 35.Konversacio/14 lingvoj / | 70 | |
| 36.P I V | 840 | |
| 37.Nega blovado | 17 | |
| 38.La gefratoj | 17 | |
| 39.la nova jaro | 17 | |
| 40.Andre el MLR | 6 | |
| 41.Libro de Apokrifoj | 12 | |
| 42.Sileziaj kantoj | 11 | |
| 43.Ora duopo | 17 | |
| 44.Radio kurso | 12 | |
| 45.Nuda inter lupoj | 38 | |
| 46.La perdita vizaĝo | 15 | |
| 47.Pri la varmo | 21 | |
| 48.Lernolibro E -I | 20 | |
| 49.Hasanagaino | 6 | |
| 50.Albo Tallin | 16 | |
| 51.Tiel profunda nokto | 21 | |
| 52.Ĉeĥoslovakio | 7 | |
| 53.La sep fratoj | 45 | |
| 54.Elekto de I.L. | 85 | |
| 55.PANORAMO -Kaleidosk. | 16 | |

\+ Se la libroj de mi menditaj ne estas en via stoko mia mendilo validas ĝis vi ĝin renove havos/ ne validas kaj mi rezignas je tiuĉi titolo/.

\+ Forstreku kio ne validas el teksto.

En ..................

....................................

....................................
plena adreso kaj subskribo

65



## HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon - kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas : la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

Ĉ E Ĥ O S L O V A K A J B A N L O K O J
- oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro -

**BALNEA**

KARLOVY VARY
FRANTIŠKOVY LÁZNĚ
MARIÁNSKÉ LÁZNĚ
JÁCHYMOV
TEPLICE V ČECHÁCH
PODĚBRADY
JÁNSKÉ LÁZNĚ - TŘEBOŇ
JESENÍK - LUHAČOVICE
TEPLICE NAD BEČVOU

Reprezentanto
de ĉeĥoslovakaj
banlokoj
kaj kurac-fontoj,
Pařížská třída 11,
110 01 PRAHA 1
ĈEĤOSLOVAKIO
Tx: 122 215

BALNEA
PRAHA

6523




# GALERIO "KAROLINA"

PODNIK ČESKÉHO FONDU
VÝTVARNÝCH UMĚNÍ

Železná 6, Praha 1, Staré Město

bildoj, grafikaĵoj, plastikaĵoj, vitro kaj art-juveloj
de nuntempaj plastik-artistoj

vendo-tempo: lundo ĝis vendredo 10-18 horo
sabate 10-13 horo

6524